

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 20, Aŭgusto 2019



*La memorinda Karin Boye je la urba biblioteko "Stadsbiblioteket"*

*Al la tuta mondo:*

***Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!***

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

***[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)***

## Enhavo

Enhavo .....	2	Inga Johansson: information om Kina via Radiokorrespondenterna .....	14
Pri Ora Ĵurnalo .....	2	Mirinda Finnlando – gvidlibro por vizitantoj .....	15
Espe-Porko meditas .....	3	Esperanto-Sabato 3 aŭgusto – Eĥo de la UK .....	16
Karin Boye, Hjalmar Gullberg kaj Sten Johansson .....	4	La 104-a UK .....	27
Amazono mortis – Död amazon .....	5	UK kaj LKK .....	28
Urba promeno de Järntorget al restoracio en Slottsskogen .....	6	Sylvain Lelarge – alte taksita instruisto de Paroligaj lecionoj dum UK en Lahtio .....	29
”Panribelo” en Gotenburgo .....	7	La Ekskursita tago, busvojaĝo al du bienoj ....	31
Nelly Thüring .....	7	Muziko kaj kantoj... multe kontribuas al la bona etoso .....	33
Ŝipkompanio por la vaporŝipo ”Sofia” .....	8	Kajto daŭre fascinas sian publikon! .....	33
Palacarbaro en Gotenburgo .....	9	Sveaborg – Suomenlinna .....	35
La blanka bendo – Vita bandet .....	9	Sveaborg/Suomenlinna – populara vizitloko .....	38
Lady Florence Norman veturis per ”elektra puŝskotero” .....	10	De Helsinki al Stokholmo per la ŝipo Gabriella .....	40
Franco flugas per ”elektra tabuleto” al Anglio .....	10	Galileo Galilei, 1564–1642 .....	42
Someraj memoroj .....	11	Pri la vivo de elmigrinta svedo .....	43
La troglodito – svede: gårdsmygen .....	12	Mia vivo en Estonio – Linus Ganman .....	44
Arĝentmevo aŭ Laro arĝenta vizitas Elviran en Gdansko .....	12	Notoj el Veckan, magazino de 1904 .....	46
Anekdotoj el 1904 .....	12	Saluton .....	47
La ermitoj en la tajgo .....	13		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Kontaktu iun el la redaktantoj se vi volas viziti la librejon.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com).

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

# Espe-Porko meditas



☼ Eraro pri la nomoj de arboj en numero 19 paĝo 25: La bildo ne montras la esperantan

jubilean kverkon en Sopot, sed la esperantan kverkon en Gdynia. Pardonon karaj kverkoj. Sed pri la sveda esperanta kverko en Gunnilse mi neniam eraru!!!

- ☼ La ĉefa temo por la aŭgusta numero estas la UK en Lahtio, Finnlando.
- ☼ Por havi bonan grupfoton pri (preskaŭ) ĉiuj partoprenantoj, oni uzis spavon (svede: drönare, angle: UAV – Unmanned Aerial Vehicle). La vorton "spavo" mi prenis el Facebook, sed Birgitta Anevik trovis alian vorton: "droneo". Eble ĝi estas la ĝusta esperanta vorto. Ĉu vi scias??
- ☼ La temo por la UK estis: "Vivanta naturo, floranta kulturo". Eĉ mi floras.
- ☼ Nova prezidanto por UEA estas Duncan Charters.
- ☼ Venontaj UK okazos en 2020 en Toronto, Kanado, kaj 2021 en Belfasto, Irlando.
- ☼ Kvin personoj el la gotenburga klubo partoprenis: Andreas, Roger, Magnus, Ingegerd kaj Siv. Krom esperanton Andreas kaj Roger ankaŭ praktikis la finnan.
- ☼ La futbalmaĉo inter la Esperantista teamo kaj loka Lahtia teamo finiĝis 5–2.
- ☼ Nekredeble – la esperantistoj venkis! La teamoj enhavis kaj viroj kaj virinoj.



- ☼ La lago ĉe Lahtio nomiĝas Vesijärvi (vesi = akvo, järvi = lago, do akvolago!)
- ☼ Finnlandon oni nomas "la lando de mil lagoj". (Ĉu ne troviĝas pliaj en Svedio??)
- ☼ Eble la finnoj sendas pli da leteroj ol ni en Svedio, ĉar la finnaj leterkestoj havas duoblan volumenon ol la niaj.
- ☼ Atentu seĝojn kun moveblaj sidseĝoj! Ili abundas en la Areno! Se oni de antaŭe volas supertreti la seĝon (por ne ĝeni la jam sidantajn personojn), la sidseĝo povas stariĝi vertikale kaj subite ambaŭ kruroj povas fiksiĝi inter la sidseĝo kaj la siddorso. Okazis al iu, kiu forgesis ke ŝi estas pensiulino. La rentgenaj bildoj montris ke tri el la ostoj de la maldekstra piedo estis rompitaĵ. Konsilo: Ĉiam iru la ordinaran vojon kaj ne fidu seĝojn kun moveblaj sidseĝoj!! ☹
- ☼ La numero enhavas artikuleton pri nova maniero rapide transiri la Manikan kanalon. Se vi ne ŝatas la rapidecon de nia tempo – bv legu la "Ermitoj en la tajgo", dokumento pri rusa familio, kiu elektis vivon for de la civilizacio. Rakel Nylén legis kaj recenzis ĝin. Bone havi novan kunlaboranton! La libro troviĝas ruse kaj svede, sed ĝi meritas esti tradukita en Esperanton!
- ☼ Ora Ĵurnalo en ĉi tiu numero havas pliajn novajn kunlaborantojn:
- ☼ Sylvain Lelarge el Nederlando, Linus Ganman el Estonio kaj Sten Johansson el Svedio. Bonege!!
- ☼ **Se vi pensas, ke mankas interesa temo en Ora Ĵurnalo – bv sendi al ni artikolon!**




/Siv

# Karin Boye, Hjalmar Gullberg kaj Sten Johansson

Jena numero de Ora Ĵurnalo havas sur la unua paĝo bildon pri la statuo de Karin Boje staranta apud la urba biblioteko de Gotenburgo. Komprenoble ni volis enmeti la poemon "Död amazon" ("Amazono mortis") de Hjalmar Gullberg, sed mankis al ni la tekston Esperante.

Mi demandis al Sten Johansson ĉu li pretus traduki la poemon. Li jesis kaj post mallonga tempo li donis al ni la malsupran tekston. Mi miras ke kaj la ritmo kaj la rimoj proksime sekvas la svedan tekston.

Ni en la Gotenburga Esperanto-klubo ĝojas havi Sten kiel preleganton la 7an de septembro dum nia Esperanto-Sabato. Pli da informoj en [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org).



lomete pri la tradukisto:

*Sten Johansson naskiĝis la unuan de aprilo en 1950 en Kalmar kaj loĝas nun en Norrköping. Li laboris en urba administrejo, pri statistiko, prognozoj kaj analizado pri publikaj servoj, sed en 2014 li emeritiĝis.*

*En sia libera tempo li verkas en Esperanto interalie novelojn, krimromanetojn, eseojn, facillegaĵojn kaj romanojn. Li ankaŭ kolektas informojn kaj recenzojn pri originala Esperanta literaturo kaj aŭtoroj.*

*En 2018 li ricevis la premion de Grabowski pro lia tuta verkaro kaj ĝia valoro por la Esperanto-kulturo kaj pro liaj tekstoj, kiuj helpas aliajn homojn verki.*

(teksto trovita ĉe Vikipedio) /Siv

## Jen teksto de Sten pri la poemo:

En majo 1941 aperis en la sveda literatura revuo BLM poemo de Hjalmar Gullberg (1898–1961) pri du okazaĵoj: la germana armeo konkeranta Grekion la 24-an de aprilo 1941 atingis la pasejon de Termopilo (Θερμοπύλαι), kie aŭstraliaj kaj novzelandaj trupoj vane klopodis kontraŭstari al ĝi, kaj samtempe la sveda poetino Karin Boye (1900–1941) nokte inter la 23-a kaj 24-a de aprilo forpasis pro supozata sinmortigo. Termopilo estas konata el la historio pro batalo en la jaro 480 a. K. inter 300 spartanoj gvidataj de Leonido (Λεωνίδας) kaj la

superforto de la persa reĝo Kserkso (Khshayārsha). Ĉiuj spartanoj pereis en tiu batalo, sed ili sukcesis prokrasti la persan konkeron de Ateno kaj aliaj helenaj urboj. Ambaŭ poetoj, Karin Boye kaj Hjalmar Gullberg, estis aktivaj pri agitado kontraŭ la naziismo. Jen mia provo traduki la konatan poemon. Nike (Νίκη) estas la helena diino de venko; Hadeso (Ήδης) la dio (kaj regno) de morto. Plibonigaj proponoj estos bonvenaj.

Sten Johansson

*Sekvas la poemo:*

## Amazono mortis

(de Hjalmar Gullberg)

Glav' luktanta la superforton,  
vi rompiĝos sur la ambos'!  
Staras trupoj laŭ telegram' en  
Termopilo, la greka ŝlos'.  
Malaperis la kvardekjara  
Karin Boye de Alingsås.

Tre malhela kaj grandokula;  
ŝi sin vestis por la forir'.  
Trans jarcentoj ŝi serĉas vojon,  
de libero kaj de martir',  
kie brave herooj Spartaj  
frontis morton ĝis lasta vir'.

Nike ne per la venko-laŭroj  
kronis Kserkson pro la perfid'  
je muziko de flut' kaj harpo.  
Tombe putras li en mucid'.  
Laŭda ĥoro eterne gloros  
la malvenkon de Leonid'.

Termopilo en nia koro  
restos daŭre por ni destin'.  
Al Hadeso hodiaŭ iras,  
dum helenoj postsekvas ŝin,  
tre malhela kaj grandokula  
la mortinta kamaradin'.

## Död amazon

(av Hjalmar Gullberg)

Svärd som fäktar mot övermakten,  
du skall brytas och sönderslås!  
Starka trupper ha enligt T.T.  
nått Thermopyle, Greklands lås  
Fyrtioåriga Karin Boye  
efterlyses från Alingsås.

Mycket mörk och med stora ögon;  
klädd i resdräkt, när hon försvann.  
Kanske söker hon bortom sekler,  
dit en spårhund ej vägen fann,  
frihetspasset där Spartas hjältar  
valde döden till sista man.

Ej har Nike med segerkransen  
krönt vid flöjtspel och harposlag  
perserkonungen, jordens gissel.  
Glömd förvittrar hans sarkofag.  
Hyllningkören skall evigt handla  
om Leonidas' nederlag.

För Thermopyle i vårt hjärta  
måste några ge livet än.  
Denna dag stiger ned till Hades,  
följd av stolta hellenska män,  
mycket mörk och med stora ögon  
deras syster och döda vän.



HJALMAR GULLBERG



## Urba promeno de Järntorget al restoracio en Slottsskogen



Ingegerd faris la tekstojn pri interesaj "haltejoj" dum la promeno. Unue fotoj de Järntorget, kie ni komencis la promenon. La monumento malantaŭ la grupo nomiĝas Guldkryckan – La Ora bastono.

**Sur la fronto estas plaketo: "Memore al tiuj, kiuj batalis por pano, justeco kaj libereco. Tion, kion ili venkis, ni heredis. La heredo disvolvigas."**

Jen foto pri la "panribelo" en 1917.



En Slottsskogen staras monumento pri unueco.



# ”Panribelo” en Gotenburgo

En majo 1917 estis malsato kaj mizero por multaj familioj en Gotenburgo.



La panribelo estis reakcio al la ombro de la unua mondmilito. Oni kulpigis la severan nutraĵpolitikon pro la mizero de ordinaraj homoj. Oni ricevis pli ol sufiĉe!

Kulmino estis kiam 40.000 personoj kolektiĝis en amasa manifestacio en ejoj de ”Annedal, Haga, Masthugget kaj Landala”. Oni postulis la rajton aĉeti panon kaj terpomojn sen porciumadokuponoj.

La policistaro kaj la militistoj de ”Kviberg” estis konskripciitaj por venki tumultojn, kiuj daŭris ĝis la 17 h. de la 5:an de majo en 1917.

## Nelly Thüring

Nelly Thüring estis membro de nutraĵkomisio 1917–18. Ŝi prenis sur sin aktivan rolon por interveni en la panribelo en Gotenburgo. Ŝia profesio estis fotografisto. Ŝi estis inter la unuaj virinoj, kiuj gvidis la landon. De 1922 ĝis 1928 ŝi estis membro de la dua ĉambro de la parlamento por la Gotenburga mandato. Kiel socialdemokratia membro ŝi havis la ambicion plifortigi la virinan klubon ene de la partio. Ŝi realigis aferojn kun sociaj temoj kun granda engaĝiĝo.



Por iu, kiu volas scii pli, estas multe da legaĵo en ”Svenskt kvinnobiografiskt lexikon”.





# Ŝipkompanio por la vaporŝipo "Sofia"



La reĝo Oscar II havis multajn personajn kutimojn kaj instinktojn.

"Ŝipkompanio por la vaporŝipo Sofia" estis nenio ajn ol apartamento en "Linnégatan 9" kie la majesto faris al si konstantan amuzon, festojn kaj amaferojn. Ĉu li estis tiel malica, ke li celis sian bonfarantan edzinon Sofia, parolante pri la vaporŝipo? La kompatinda reĝino estis malsana.

Kontraŭ la reĝa apartamento, aliflanke de la strato, la posedanto enmasonigis grimacan malican diablon por ke la reĝo estu pensanta pri sia diboĉa vivado. La reĝo Oscar II estis de siaj samtempanoj rigardata pompa, grandulfreneza kaj tro

zorgema pri sia digno. Li parolis multajn lingvojn. Krome li skribis poemojn, kiujn li poste ne volis akcepti. Li ne nur skribis siajn reĝajn paroladojn sed ankaŭ sian propran biografion.

Reĝo Oscar II estis talenta laŭ viktoria duobla moralnormo kaj mensogemo. Li kulpigis August Strindberg kaj aliajn por detruigi la moralon. Samtempe li mem posedis

la plej grandan pornografian kolekton en Svedio.

Ĉiuj fabeloj havas finon!

Nun la reĝo Oscar II kaj la reĝino Sofia ripozas en la eterna dormo ene de preĝejo "Riddarholmskyrkan" en Stokholmo.

La tempo metis pardonan brilon super eraroj kaj meritoj...





# Palacarbaro en Gotenburgo



”Slottsskogen” estas la granda pulmo de Gotenburgo!

Ĝi estas ankaŭ parko, kiu havas areon je 137 hektaroj, fondita en la jaro 1814.

Unu el la fondintoj estis August Kobb, 1819 – 1901, kiu ankaŭ nomiĝas ”La patro de la palacarbaro”.

Estis la olda palaco ”Älvsborg”, kiu situis ĉe ”Göta älv”, kiu donis nomon al la parko. Hodiaŭ la parko funkcias kiel ekzercad- kaj ripozloko kun diversaj sporteventoj. Ankaŭ klasikaj koncertoj, rokenrolo kaj aliaj popularaj festoj okazas ĉi tie.

”Slottsskogen” kun ĝia naturo kaj bestoj, la fokbaseno, la bieno por infanoj, alkoprotektejoj ktp garantias memorindan viziton ĉi tie.

Ene en la observatorio vi povas rigardi la stelojn serĉante pli bonan ejon ol ”Slottsskogen”.

## La blanka bendo – Vita bandet

”Vita bandet” la restoracio, kiu malfermiĝis jam en la jaro 1877, nomiĝas hodiaŭ ”Villa Belparc” kaj estas populara renkontejo dum labortagoj kaj festenoj. Oni povas travivi eĉ ”sudlandan” vesperon en la ekstera servado ĉe la ”Granda lageto” (Stora Dammen) somere en ”Slottsskogen” se la suno brilas.

/Ingegerd



## Lady Florence Norman veturis per "elektra puŝkoterono"

Ĉu vi pensas ke puŝkoterono estas nova fenomeno? Tute ne. Jam en 1916 Florence Norman veturis tiele. Ŝi estas konata feministino (svede: suffragett) kiu vivis de 1883 ĝis 1964. Samkiel ŝia patrino, ŝi estis aktiva en "Women's Liberal Federation". Ŝiaj fratoj estis politikistoj por la Liberala partio kaj ŝia edzo – ekde 1907 – Sir Henry Norman, membro de la parlamento de Wolverhampton, arde laboris por la egalrajtoj de virinoj.

Dum la unua mondmilito Lady Florence estris malsanulejon en Francio.

La puŝkoteronoj estis fabrikitaj en Usono kaj en Germanio. Oni bezonis rapidajn transportojn. Raportoj de Novjorko diris ke krimuloj trovis la skoteronojn uzeblaj. Policistoj en aŭtoj ne povis sekvi ilin sur mallarĝaj stratetoj.

Hodiaŭ la puŝkoteronoj estas popularaj en la urboj. En Gotenburgo ni vidas ilin ĉie. Bedaŭrinde akcidentoj de tempo al tempo okazas. /Siv



*Bildo el Interreto.*

## Franco flugas per "elektra tabuleto" al Anglio

raportas Aftonbladet la 4an de aŭgusto.

Tio okazis 110 jarojn post ke homo flugis inter Anglio kaj Francio por la unua fojo.

La rapideco estis po 140 km/h kaj la flugo daŭris ĉirkaŭ 20 minutojn. La alteco variis inter 15 kaj 20 metroj. La inventisto nomiĝas Franky Zapata kaj ĉi tio estis lia dua provo. /Siv





# Someraj memoroj

Elwira fotis...




1) en Svedio: atendente la vaporŝipon al Marstrand.



2) en Pollando – lando de grandiozaj teatraĵoj.



## La troglodito – svede: gärdsmygen



La troglodito estas la dua plej malgranda birdo en Svedio. Nur la eta regolo estas pli malgranda. Kun la mallonga kaj staranta vosto la troglodito estas nur 9,5 centimetra.

La eta kanajlo havas fortan kaj trilantan kanton. La koloroj estas bruna kaj griza laŭ mia opinio. Ĝi vivas sur la tero. La nesto estas el musko kaj troviĝas ekz. ĉe la radikoj de junipero. La birdo vivas en diversaj medioj – en arbaroj, ĉe lagoj, en riveretaj ravinoj kaj en urboj. La saltanta birdo estas amata kaj donas multan ĝojon al mi.  
/Ingegerd

## Argentmevo aŭ Laro argenta vizitas Elviran en Gdansko

Estas **Jan Hellström**, membro de GOF, la Gotenburga ornitologa asocio, kiu difinis la birdon. Li diras ke pole ĝi estas **mewa srebrzysta** kaj svede **gråtrut**.

Li skribas: En Norda Eŭropo ĝi estas tre disvastigita. Ĝi estas videbla laŭlonge de la marbordoj, sed ankaŭ en la landinterno, kie ĝi serĉas nutraĵon ekz. en kampoj kaj rubejoj. Ĝi restas kaj dormas sur moleoj kaj protektitaj insuloj al kiuj ili alte flugas kaj ofte en formaĵo. Ili rondflugas en grandaj grupoj dum trankvilaj sunaj tagoj. Ili manĝas preskaŭ ĉion.

*Elwira Twardowska fotis.*



## Anekdotoj el 1904

RECIPROKA FLATADO – Li: "Ho, mia fraŭlino, kiel vi estas aminda!"

Ŝi: "Domaĝe, ke mi ne povas diri la samon!"

Li: "Faru kiel mi, mensogu!"

IA AVANTAĜO – La kliento: "Mi aŭdis, ke vi kiel specialaĵon vendas aŭtomobil-cigarojn. Kia estas tiu speco?"

La tabakvendisto: "Bonega. Fumante ĝin oni ne sentas la odoron de benzino."


# La ermitoj en la tajgo

## Rakel Nylén legis libron pri la strebo de rusa familio travivi en la siberia sovaĝejo

Certaj libroj restadas kun varmo. La ĵurnalisto Vasilij Peskov venigas la leganton en ĉi tiun neverŝajnan, sed veran rakonton pri rusa ermita familio meze en la senhoma kaj malfacile alirebla siberia tajgo. Vasilij Peskov ekscias pri la familio, kiun oni trovis dum flugado al fora geologia bazo.

Li tiom ekscivolemas ke li iras tien kaj loĝas kune kun la familio dum kelka tempo. Li volas kompreni kiel ili kapablis vivteni sin en malmilda klimato kun pli ol 30 gradoj sub la zero vintre kaj dum la mallonga somero.

Evidentas, ke la familio apartenas al la "Raskolnikoj" (svede: gammaltroende), kiel oni nomas la posteulojn, kiuj je granda skismo 1666–1667 forlasis la rusa-ortodoksan eklezion.



La familio konsistas el kvin personoj, el kiuj kvar estas la plenkreskaj infanoj. La patrino estis morta. Ili vivas preĝante, izolitaj de la mondo ĉirkaŭ si. Ili vivis sen kontakto kun la

mondo dum 40 jaroj. Ĉar vera kristano ne povas vivi en la mondo.

La tradicio radikas en diverĝeco kun la eklezio antaŭ 400 jaroj, kiam oni volis teni sin al la malnova traduko de la biblio. Post tio la raskolnikoj fortiriĝis el la mondo en izolitajn vilaĝojn kaj kelkaj faris unu paŝon pli kiel la familio Lykov.

En la vivo de la familio abundas afliktoj kaj peniga laborado por havi nutraĵon kaj travivi la vintrojn. Materie ili vivas kiel en la mezepoko kaj havas limigitan manĝon.

Sed tio estas vera "feelgood libro" (bona-sento-libro). Ĝi estas skribita kun varmo kaj respekto por tiuj homoj, kiuj elektis tian malordinaran vivon.

Ekas profunda kaj longdaŭra amikeco inter la ĵurnalisto, la geologoj kaj la familio Lykov.

Iĝas multaj vizitoj en la tajgon. Estas fascine observi la renkontojn de la familio kun la mondo ĉirkaŭe. Tiuj, kiuj dum multaj jaroj, retiriĝis de la mondo, nun ne volas vivi sen la kontakto kun siaj novaj amikoj. La ofertitan helpon ili akceptas, se ĝi ne kontraŭas ilian

kredon. Tiaokaze ili afable rifuzas kun la vortoj: "tio ne estas por ni".

En tempo, kiam la timo por la fremda kaj alispeca estas forta, tiu libro povus esti memorigo ke ni ĉiuj estas homoj. Ni havas multon por gajni se ni malfermiĝos al la alia, al la fremdulo. Tio povas igi niajn vivojn pli riĉaj.

## Inga Johansson: information om Kina via Radiokorrespondenterna

Programmet Radiokorrespondenterna vill att lyssnarna ska skriva om sina erfarenheter om Kina på torsdag 8 augusti.

Detta har jag sänt till dem idag.

*Deras hemsida:*

<https://sverigesradio.se/radiokorrespondenterna>



Från: Inga Johansson

Skickat: den 5 augusti 2019 14:30

Till: utrikes@sverigesradio.se

Ämne: information om Kina via Radiokorrespondenterna

Jag bara undrar varför ingen Radiokorrespondent någonsin har nämnt möjligheten att få information om Kina genom att först lära sig esperanto och mötas på halva vägen. Jag har i 50 år fått underrättelser från Kina genom att först prenumerera på papperstidningen

<http://www.espero.com.cn> och när internet slog igenom läsa den på nätet:

<http://esperanto.cri.cn>

Jag kan lyssna på kinesisk pod-radio – <http://esperanto.cri.cn/radio/video.htm>

och jag kan följa alla länkar på nätet.

Jag får tips om böcker och musik: [http://www.espero.com.cn/2018-12/25/content\\_74310535.htm](http://www.espero.com.cn/2018-12/25/content_74310535.htm)

Dessutom har jag haft besök från Kina, Taivan och HongKong.

Nu kommer regelbundet Unesco Kuriren, som redigeras av en man från Kina:

[https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000265211\\_epo](https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000265211_epo)

<http://kuriero.esperas.info>

[http://esperanto.china.org.cn/2019-07/17/content\\_75002571.htm](http://esperanto.china.org.cn/2019-07/17/content_75002571.htm)

[http://esperanto.china.org.cn/node\\_7117776.htm](http://esperanto.china.org.cn/node_7117776.htm)

[http://esperanto.china.org.cn/2019-06/28/content\\_74931241.htm](http://esperanto.china.org.cn/2019-06/28/content_74931241.htm)

Från Kina kan jag få reda på vad denne ungrare skrev på esperanto – jag kan varken kinesiska eller ungerska!

[http://esperanto.china.org.cn/2011-02/11/content\\_22552143.htm](http://esperanto.china.org.cn/2011-02/11/content_22552143.htm)

Bilder från Kina:

[http://esperanto.china.org.cn/2009-10/19/content\\_22552138.htm](http://esperanto.china.org.cn/2009-10/19/content_22552138.htm)

[http://esperanto.china.org.cn/2017-02/16/content\\_40300285.htm](http://esperanto.china.org.cn/2017-02/16/content_40300285.htm)

[http://www.espero.com.cn/2019-06/05/content\\_74857652.htm](http://www.espero.com.cn/2019-06/05/content_74857652.htm)



Det är alltså en gåta för mig att man aldrig nämner fördelen med att lära ett propedeutiskt språk här i Sverige och i Kina för att få kontakt med varandra.


Inga Johansson Göteborg

## Mirinda Finnlando – gvidlibro por vizitantoj

Antaŭ ol vojaĝi al Finnlando indas iomete scii pri la lando. Ann-Gerd Steinby faris facilan gvidlibron pri Finnlando. Bedaŭrinde ŝi ne menciis Lahtion.

Mi plukas kelkajn informetojn el la libro:

- Saŭno estas sociala fenomeno. La svedoj ne scias kiel fari laŭ la "ĝusta maniero". ☺
- La Finnlandaj arbaroj estas la verda oro de la lando.
- Nacia tago estas la 6an de decembro.
- Loĝas ĉirkaŭ 5,3 milionoj en la lando.
- La finna kaj la sveda estas la naciaj lingvoj de la lando laŭ leĝo de 1919. Nun 91 % parolas la finnan kaj 5 % la svedan.
- Nenie en la mondo troviĝas popolo, kiu tiel arde legas gazetojn, laŭ procenta kalkulo po persono.
- Ekde 1996 Finnlando estas inter la plej multaj uzantoj de Interreto.
- Nacia eposo: Kalevala. Ĉiu scias pri ĝi, sed ne multaj legis ĝin. Por la memkonfido de la nacio, ĝi gravas.



• La nacia poeto, Johan Runeberg, ankaŭ kontribuis al la nacia memkonfido. La Runebergan tagon oni festenas la 5an de februaro – eble kun la Runeberga Torto. Recepto en la libro.


• Finnlando estas la unua lando de Eŭropo, kiu donis voĉrajton al virinoj – en 1906.

• Laŭ la libro: la placo de la Senato en Helsinki – Senatstorget – estas la plej bela placo en Nordio.

- Sportoj estas alte taksataj. "Boboll" – vario de baseball – estas la nacia sporto, sed glaciĥokeo estas la plej populara sporto. Ankaŭ pri aliaj vintraj sportoj Finnlando estas internacie fama.
- La finnan tanton oni dancas je la sonoj de dolĉe melankolia muziko.
- "Sisu" estas vorto per kiu oni karakterizas la finnlandanojn. La signifo estas: forto, persisto, eltenado, batalemo, energio. Kun iomete da sisu oni povas fari la plej multon.

Mirinda Finnlando! /Siv

*Panoramo de Lahtio el la pinto de la plej alta skisaltejo. Fotis Andreas.*




# Esperanto-Sabato 3 aŭgusto – Eŝo de la UK



◀ Alta aventuro en Stokholmo antaŭ la aventuro vojaĝi al la kongreso en finnlanda Lahti.

La viro – Roger – kiu veturigis la Gotenburgan grupon al la pramo en Stokholmo kaj al Lahti. ▶



Moderna "Vikinga ŝipo"!



luj el nuntempaj vikingoj kiuj vojaĝis por interesa komisio.



Soile Lingman kaj Roger Nilsson diskutas sur la granda maro.



Kvar personoj en mallarĝa ejo plej sube en la ŝipo. Siv havas longan krurojn kaj mi havas ŝtupetaron.





Alvenintaj en Lahtio.




Tri skisaltejoj situas apud la kongresejo.  
Somere troviĝas ankaŭ naĝbaseno.




1918 finiĝis la Finnlanda libera milito. La batalo temis pri "Ruĝaj kontraŭ blankaj". Ĉar la "blankaj" venkis, multaj "ruĝaj" ekzekutiĝis. La monumento en la parko estas pri tio.



Mirelle Grosjean havas bonan kunestulinon.  
Estas la pranepino de Ludoviko Zamenhof  
parolanta dum la inaŭguro de la kongreso.



– Kion faras Siv en la amaso kiu staras sur la ejo  
apud la scenejo?



– Nu, ŝi havas la honoron esti la sveda  
persono kiu bondeziru al la kongreso.  
Siv faris la plej bonan bondeziron, ŝi  
sukcesis!





La majstro de tretorgeno. Tre streĉa muziko.

La areno kiu donis multajn okazojn, prelegojn, kafon, bieron, muzikon, lerneblecojn ktp... ►



◀ Mia plej bongusta manĝo kiun mi manĝis dum la kongresaj tagoj en Lahti.

Troviĝas ankaŭ vegetara alternativo en la Itala restoracio. ►



La partoprenanto dormas bone dum la teda prelego.

Manuel Rovere kantas kun ni en la ĉambro "Setälä" en la lernejo kontraŭflanke de la areno.








Mi kaj Siv kantis "Hisu la velojn" kune kun Kajto.



Kaj "Kajto" estas tre bona kantogrupo kiu "hisu la velojn" por la ĝojaj kantoj.



Ekstere, ĉe la Sibelius-halo. Ĉi tie regas plezuro kaj kulturo.



Bona konatiĝo, sveda virino kiu loĝas en Kanado. Ŝi partoprenis ĉie kun ĉio. Tie ĉi en la halo de Sibelius.




Vidaĵo ekster Sibelius-halo: la haveno de Vesijärvi. (Andreas fotis.)



En la haveno ni trinkas kafon kun Sten Johansson. La verkisto kiu intencas viziti nin en aŭtuno.





Aplaŭdistino por la Esperanta teamo kiu gajnis per 5–2. Rezista teamo estis Lahtia teamo.

– Ni gajnis!  
– Ni revas pri Esperanto en la tuta mondo.



La plej bona instruisto! Tute franca. Mi vere ĝuis tiun lecionon kun Sylvan Lelarge.




Tiu virino nomiĝas PARK Jeong Suk kaj mi ricevis inviton al Suda Koreio de ŝi.



◀ La junaj Esperantistoj kiu konkursis en elokvento.

Tatu el Stokholmo! Elokvent-parolanto kaj piedpilk-ludanto. ▶







"Caruso" laŭ Magnus, havas koncerton en la areno, salono Lapenna.



Bela kaj vigla knabo. Mi demandis pri foti lin kaj "Jes" li permesis.



– Mi ankaŭ volas foti, la knabo diras kaj mi permesas. Mi pensas ke estas bona rezulto.



Lahti-gazetoj skribis pri Esperanto.



Tri sinjorinoj iris en parko.



"Subiris jam la luma sun" ...





La gvidanto Harri Laine kiu parolis esperanton dum la busvojaĝo.



La mastrino de la unua bieno. Speciala produkto en ŝia bieno estas greno por fari viskion, sed la mastrino havas multe da aliaj objektoj por vendi.



Koreino meze de greno kampo.



La pordego al la finnlanda naturo.



La finnlanda ĉiĉerono kiu ne parolas esperanton. Ekster la olda preĝejo.




Interne de la preĝejo de Hollola ekzistas ne tretorgeno... nur grandega tuborgeno.





Dramecaj,  
malnovaj  
skulptaĵoj.



Ankaŭ en Finnlando naskiĝas infanoj kun malsanaj koroj.  
La urseto estas la internacia simbolo.



Pentristino Asta Pulkkinen en sia  
hejmo bonvenigas al ekspozicio.



La paro de dua bieno kie ni manĝis kaj restis antaŭ ol la buso  
revojaĝis al Lahti. La mastro rakontis pri la historio de la bieno kaj  
ni iris aŭskultante. La mastrino sciis paroli la svedan lingvon kaj  
rakontis ke ŝi legas librojn en la sveda lingvo, specife Astrid  
Lindgren. La mastrino ne volas perdi la svedan lingvon.



Arbpremanto el Ĉinio.



La granda finalo kun Asorti kun amikoj kaj aliaj aventuroj.





La granda finalo kun "Caruso" sed Magnus ne estas en la ĥoro.



Roger suferas pro la varmo!

Siv solvis la problemon, nun li ne suferas!



– Al Sveaborg/Suomenlinna! Piratoj venas malantaŭe!



La pordego de granda Sveaborg.






Magnus patrolis sur milita grundo sub sia ĉapelo.



Tie okazas strangaj aventuroj laŭ mia libro "Cold Case Gustaf III", vere strangaj!



Geedziĝfestoj estas oftaj tie ĉi!



Andreas iras sub la suno sur la vojoj de Sveaborg.



Dancoj kaj kantoj el Afriko ekster la preĝejo... belege...





Du uloj atendis... atendis... atendis...



Magnus kaj Andreas manĝas glaciaĵon en Helsinki.



Mi estis tie! La granda, blanka preĝejo en Helsinki! – Impona! – Impresa!

Ĝis revido Finnlando!



*Tekstoj kaj bildoj :  
Ingegerd Granat,  
Gotenburgo*



*En la kongresejo. Fotis Andreas.*



# La 104-a UK

Lahtio – Finnlando

**20–27 de julio 2019**



Karaj kongresanoj! Kara najbaro Finnlando! Svedio ĝojas ke najbara lando nun havas la Universalan Kongreson. Ni deziras al vi ĉion bonan! Ni ankaŭ deziras havi pliajn kontaktojn kun vi rete kaj reale! Sukceson! *Onnea vain!* /Siv

El la enhavplena programo mi prenas kelkajn erojn:

## SABATE

- Libroservo
- Unuafojaj kongresanoj. Clay Magalhães prezentis kiel funkcia UK por novaj kongresanoj kaj aliaj. La unuan fojon, kiam li deĵoris dum UK kiel "ligilo" inter UEA kaj la lokaj deĵorantoj – estis en Gotenburgo 2003!



## DIMANĈE

- Solena Inaŭguro en la plej granda salono, ĉiam nomata "Zamenhof". Multe da paroloj, salutoj, muziko!
- Prelego pri Finnlando 1 de Tuomo Grundström
- Koncerto de Manuel Rovere

- Nacia Vespero en la Sibelius-domo. Cirko, orgenludado, popolkantoj, muzikistoj kun apartaj instrumentoj k.t.p.

## LUNDE

- Paroligaj Lecionoj kun Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge
- Koncerto kun Kajto

## MARDE

- Internacia Esperanta Koruso
- Teatraĵo – Vivo de Galileo
- Koncerto kun Ĵo Mo. Iel li logis multajn el la aŭskultantoj danci sur la scenejo. Vigle!

## MERKREDE

- La tago de ekskursoj

## JAŬDE

- Koncerto kun Ĵe-Le, patrino kaj filino
- ILEI
- Futbalmatĉo inter loka teamo kaj esperantistoj. Surprizo: La esperantistoj venkis (5–2)!
- Koncerto: Asorti
- Koncerto: Ciganaj Kantoj

## VENDREDE

- Koncerto: Internacia Esperanta Koruso
- Internacia Arta Vespero

## SABATE

- Solena Fermo

# UK kaj LKK



La foto – en kiu preskaŭ ĉiuj havas lokon – estas farita de fluganta droneo (svede: drönare). (Foto prenita el *La Saltejo*, la kongresa kuriero.)



Lahtio estas sportcentro – aparte por skiantoj kaj skisaltantoj. La kongresejo estas proksime al skisaltejoj – fakte estas tri saltejoj!

Jen skulptaĵo pri skianto ekster nia kongresejo.



Dum la kongreso nova prezidanto por UEA estis elektita. Duncan Charters nun anstataŭas Mark Fettes. Duncan estas origine el Britio sed li nun estas usonano.

Inter la kandidatoj ne estis iu virino. Mi miras!

LKK – Loka Kongresa Komitato konsistis el dek personoj. La prezidanto estis Tuomo Grundström.


Jen li inter du svedoj – Andreas kaj Ingegerd.





Eero Grundström, filo de Tuomo, traktis la tretorgenon kun vervo, unue dum la Solena Inaŭguro kaj poste dum la prelego pri Finnlando de Tuomo Grundström.

## Sylvain Lelarge – alte taksita instruisto de Paroligaj lecionoj dum UK en Lahtio



Mia nomo estas Sylvain Lelarge kaj mi jam de 17 jaroj gvidas dum UK la paroligajn kursojn por mezniveluloj. Mi estas franco sed vivas delonge en Nederlando, kune kun mia edzino Katalin Kováts, bone konata en la movado pro sia agado por edukado: ĉefe [www.edukado.net](http://www.edukado.net), sed ankaŭ KER-ekzamenoj, Ekparolu, RITE...

Mi-mem ne laboras, kiel ŝi faras, plentempe por Esperanto, sed nur okaze de kelkaj kursoj jare, kaj do de la UKoj.

Post la kvar sesioj kiujn mi donis dum la ĵus finita UK en Lahti, Finnlando, mi estis petata iom klarigi por vi, legantoj, kiu estas mia aliro al lingvoinstruado, kaj mi tion jene volonte faras. Preparante tian kurson, mi nenion scias pri mia grupo, aŭ eble pli bone dirite, mi scias nur ke mi havos grupon de kelkaj dekoj da partoprenantoj el multaj landoj, kun niveloj



sufiĉe diversaj kaj en salono kies grandecon kaj adapteblon mi ne konas.

Alveninte surloke, mia unua ago estas kontroli la kursejon. Okazis ke, malkovrante foje malvastan amfiteatron kun fiksitaj seĝoj, mi simple gvidis miajn kursojn... kaj la apuda ĝardeno. Ĉar spaco pleje gravas, ke oni povu



movi sin, iri al la alia, formi grupetojn: **libero en la korpo kreas liberon en la menso, kaj en la koro.**



La dua principo estas elekti por ĉiu tago temon, kiu vere estas interesa por kiu ajn. Ĉi-foje, tiu de la unua tago estis **'Amikeco kaj amo'** (kiu inter vi ne interesiĝas?), sekve de **'Trove la ĝustan vorton'**, kun, poste, **'La objektoj kiuj formas nian vivon'**; fine: **'La bankedo de la disiĝo'**. Por ĉiu el tiuj temoj, mi kunportis belan, surprizan, pliriĉigan materialon uzeblan je diversaj niveloj: ekzemple **serion de proverboj pri amikeco el ĉiaj kulturoj, grandajn kartojn kun vortoj kiuj aspektas similaj sed tute ne estas, aŭ kolekton de strangaj objektoj...**

Mia rolo estas zorgi ke ĉiu sentu sin bonvena, impulsi la (t)emon per bona enkonduko, klare prezenti la aktivaĵojn sen lasi la tempon al la publiko heziti, kaj subteni la interparoladon per kuraĝigo, helpo, amuzaj rimarkoj, ktp.

Mi aldonas kelkajn bonajn konsilojn pri kiel post la UK pli bone lerni sen devige studadi, kaj mezuras mian sukceson al la entuziasmonivelo de la grupo. Okazas ke gvidantoj de apudaj salonoj iom plendetas ke oni tro ridas dum miaj sesioj. 'Bona malsano' dirintus mia patrino. ☺

Fine mi aldonos ke ne temas pri simpla amuzo de la publiko, sed pri kreado de situacioj dum kiuj oni vere havas la okazon libere komuniki, kaj starigi ĉiujn demandojn pri nia bona lingvo. Erari ne malbonas, estas eĉ bonvene, ĉar tiel ĉiuj progresas.

Saluton al ĉiuj!

*Sylvain Lelarge*

---

La paroligaj kursoj dum la UKoj estas organizataj de [www.edukado.net](http://www.edukado.net), kie oni povas trovi trezoron de edukmaterialo. Membreco estas senpaga.

Povus esti foto de la haveno de Lahtio, sed ne... Nia instruisto Sylvain sendis foton de Turkio, kie li kaj Katalin Kovats libertempis. Finnlando aŭ Turkio – ne gravas. /Siv

*(Mi, la paĝaranĝanto de Ora Ĵurnalo, tamen pensas ke estas la haveno de Lahti. /Andreas)*



# La Ekskursa tago, busvojaĝo al du bienoj

La gvidanto Harri Laine (kun blanka ĉapo) sperte tradukis multajn fakvortojn, kiujn la posedantino (en flor-bluzo) uzis, rakontante pri la bona laboro.

Ni ankaŭ rigardis la ĉevalojn kaj la domon kun multe da manlaboraĵoj.



Ni spektis la plej grandan naturan fonton en Finnlando kaj promenis en la arbaro. Por bone vidi la fonton, oni devis iri per ŝtuparo al altano. La konstruaĵo nur eltenis dekopon, kaj ni atendis nian vicon. Pura akvo, pura aero!

Kune kun Ingegerd promenas Jannick Huet, kiu prizorgas la kvar staĝojn en Greziljono, la esperanta kastelo en Francio, kiu vere estas vizitinda!

Poste ni iris al la Hollola preĝejo kaj vidis grandan dekoritan pordon kaj – ene – Sankta Anna kun Maria – sed sen Jesuo. Eble ŝtelita? Ankaŭ la sveda Sankta Brigito (plej dekstra bildo) havas sian statuon en la preĝejo.

Kaj poste al artistino, kiu en sia hejmo havis mirindajn bildojn kaj manlaborojn (sube).







Dekstre la dua bieno kun interesa historio. La posedantoj rakontis pri ŝanĝoj en la klimato kaj ties influo al la produktado. Ili gvidis nin en promeno en la parksimila areo kun konstruaĵoj el diversaj epokoj.



Nur svedoj ĉe tiu tablo (sube). Oni ja, de tempo al tempo, devas malstreĉiĝi uzante onies gepatran lingvon. De maldekstre: mi, Dan Palm, Helsingborg, Rikard Nordgren, Uppsala, Ingegerd Granat kaj Andreas Nordström, Göteborg. La manĝaĵo konsistis el produktoj de la bieno. /Siv





## Muziko kaj kantoj... multe kontribuas al la bona etoso



Dimanĉe estis Nacia Vespero en la Sibelius-halo kun tre profesia kaj varia programo: cirko, orgena koncerto, popolkantoj kun nekutimaj instrumentoj k.t.p. La lumo variigis – de klara lumo ĝis magia malhelo kaj steloj sur la altaj muroj.

La aŭskultantoj poste kolektiĝis por rigardi la sunsubiron ĉe la lago Vesijärvi (la "akva lago").

Preskaŭ ĉiun tagon la Internacia Esperanta Koruso ekzercis novajn kantojn kaj la rezulto vendrede estis impona. Ĉu vi vidas Magnus kaj Linus inter la kantistoj?



## Kajto daŭre fascinas sian publikon!

Mi legis tekston en la ĉijara KD de Kajto, nomita "La Universala Arbo":


"En la jaro 1988 la grupo 'Kajto' komencis kanti Esperant-lingve. Dum la somero de 1989 – dum UK en Brajtono en Anglujo – la KD 'Kajto' estis prezentita, kiu ankaŭ

montriĝis esti la unua Esperanto-KD iam en la mondo.

[...] En la jaro 2004 – en la urbo Aalen en Germanio – la FAME Kulturpremio estis aljuĝita al Kajto kiel rekono de la graveco de ĝia kontribuo al la Esperanto muzik-kulturo."



Nuntempe Kajto konsistas el Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer, kiuj uzas ĉi tiun nomon por sia Esperanto-reperuaro. Ili ne nur kantas en Esperanto sed ankaŭ en aliaj lingvoj kaj donas koncertojn en Eŭropo, Usono, Aŭstralio kaj Azio.



En la KD troviĝas tekstoj verkitaj de Nanne Kalma, sed ankaŭ de aliaj verkistoj en esperanta traduko.

Jen unu de Nanne:

Ni atendas kaj atendas sur la vojoj en trafik'.  
senfine antaŭ ruĝaj lumoj, situacie ĉe vojkruciĝ'.  
Ni atendas senmove, dum multaj horoj en aŭtovic',  
Ni konscias ke atendado estas nia sorto en la viv'.

**Refreno kaj "Atendi-kanono"**

**Atendi, atendi, denove atendi, kutime por mi kialo por plendi.  
Atendi, atendi, atendi – sed foje, gajhumore pretiĝas mi por pli kaj plu.**

En muzeoj, poŝtoŝtancoj, ĉe ĉiuj kaso en butik',  
en stacidomoj, sur la kajoj, ĉe haltejoj atendas ni.  
Ni atendas, ĉiam atendas kaj konstatas kun emoci':  
Se eĉ ni volus, neniam povus la atendadon ĉesigi ni.

Ankie kaj Nanne uzis multajn instrumentojn. Ili kantigis nin kaj la tuta aŭskultantaro bele kantis kanonojn – post pedagogia instruado de Ankie.

El "La universala Arbo" mi prenas ĉi tiun refrenon:

*Poet' mi estas, kaj la poem'  
mi loĝas en lum', jen mia hejm'.  
Rigardas mi sur la pejzaĝ'  
kun mil folioj kiel vizaĝ'.  
Mi loĝas en lum', jen mia hejm',  
poet mi estas, kaj la poem'.*

Kiam preskaŭ ĉiuj aŭskultantoj estis for, Ingegerd kaj mi kantis kune kun Kajto ilian kanton "Ni hisu



la velojn”... kaj ni rakontis ke ni – dum la ĉeesto en ”Esperanto-Sur La Strando” en Pollando – kantis tiun kanton.

Ni esperas ke ni estontece dum multaj jaroj daŭre povos aŭskulti Kajton kaj la Kajto-muzikon kun la aparta sonoro!

Fine mi prenas mallongan kanton kun la numero sep el la KD ”La universala arbo”:

**”Fino aŭ komenco?”** de Mikaelo Bronŝtejn kaj Nanne Kalma:

***Ĉu ekas la fino aŭ daŭras, daŭras, daŭras, daŭras, daŭras, daŭras, daŭras la komenco?***

La paro ne nur kantigis kaj ”kanonigis” nin, ili ankaŭ pensigis nin. /Siv



## Sveaborg – Suomenlinna



Sabate ni iris al Helsinki kaj Sveaborg – Ingegerd, Roger, Magnus kaj (nevideblaj) Andreas kaj Siv.

Ni renkontis plurajn marveturilojn.







La insulo estas populara ejo por geedziĝoj.

Ĉiuj bezonis kapkovraĵojn kontraŭ la varma suno. Jen pirato, vakero kaj laca virino.



Finfine ankaŭ Ingegerd komprenis ke indas havi kapkovraĵon kaj aĉetis sportĉapon.



Bela naturo...



... kaj multe da kulturo.







Jen submara ŝipo.

Nun ni reiros al la ĉefurbo.



## Sveaborg/Suomenlinna – populara vizitloko

Sveaborg (svede) / Suomenlinna (finne), ekster Helsinko estas unu el la plej grandaj markasteloj de la mondo. Oni komencis konstrui Sveaborg en 1748, kiam Finnlando estis parto de Svedio. Ĝi nun troviĝas sur la listo de la mondheredaĵoj de Unesco. Hodiaŭ ĉirkaŭ 800 personoj loĝas tie, sed cent miloj da turistoj vizitas la insulon ĉiun jaron.


Finnlando havas "militan historion":

La sveda periodo: 1748–1808

La rusa periodo: 1808 – 1918

Ekde 1918 Finnlando ja estas memstara lando.

Ligita al la historio de Sveaborg estas Carl Olof Cronstedt. Post venko en Svensksund,



dum la milito kontraŭ la rusoj en 1790, la sveda reĝo Gustav III honoris lin per pluraj altrangaj oficoj. En 1801 li estis vicadmiralino de la marborda ŝiparo, sed li falis en malfavoron ĉe la nova reĝo Gustav IV, kaj – fariĝis komandanto de Sveaborg!

Kiam Sveaborg estis sieĝita en 1808, la reĝo ne sendis helpon. Do, Cronstedt – same kiel multaj aliaj – opiniis ke la milito kontraŭ la grandpotenco Rusio estu sensenca, kaj li kapitulacis.


En Svedio oni rigardis Cronstedt ŝtatperfidulo. Pro la perdo de Finnlando multaj oficioj estis juĝitaj, inter ili Cronstedt.

La rusa caro proklamis ĝeneralan amnestion kaj la juĝoprocedo finiĝis. En 1809 Cronstedt

perdis sian oficon, sian nobelecon kaj la rajton porti siajn svedajn ordenojn. Tamen li – ĝis sia morto en 1820 – ĉiam portis siajn ordenojn.


El Interreto – Siv

*En Suomenlinna troviĝas la birdo Branta leucopsis – svede Vitkindad gås – amase. Ankaŭ en Lahtio ĝi oftas. Fotis Andreas.*





## De Helsinki al Stokholmo per la ŝipo Gabriella



La maro estas trankvila.

Sten Johansson montras ke ni povas vidi kaj Finnlandon kaj Estonion samtempe dum kelka tempo.




La ŝipo Gabriella havas multajn etaĝojn. Jen la plej supra.



Kaj jen sekcio por hundoj, fumantoj –  
kaj tiuj, kiuj ne ŝatas tro da vento.

*Ingegerd, Sten kaj Andreas.*

Ĉiam novaj vidindaĵoj.




Insuloj troviĝas, sed plej abundas proksime al  
Stokholmo.





# Galileo Galilei, 1564–1642



GALILEI FOJE RICEVAS la epiteton "la patro de la naturscienco". Li estis konvinkita ke oni povus prui hipotezojn pri la naturo per observadoj kaj eksperimentoj. Krome li asertis ke du veroj ne povus kontraŭdiri unu la alian.

**La pendolo.** Foje Galilei sidis en la katedralo de Pisa dum meso. Li rimarkis incensujon kiu svingis tien–reen kaj ke la tempo inter la osciladoj estis la sama, kaj je grandaj svingoj, kaj je malgrandaj. Poste li iris hejmen por eksperimenti pri diversaj pendoloj kaj baldaŭ li povis formuli regulon pri la movoj de pendoloj.

**La gravitado.** Galilei ankaŭ esploris kiel rapide diversaj objektoj falas. Je siaj eksperimentoj li laŭdire staris kune kun siaj studentoj plej supre sur la kliniĝinta turo en Pisa kaj lasis diversajn objektojn fali. Li ankaŭ eksperimentis pri globetoj, kiuj ruliĝis en dekliva defluilo. La globetoj tiam falis malsimile rapide je malsimilaj deklivoj. Sed sendepende de la maso, kaj la rapideco kaj la kliniĝo de la defluilo, ĉiuj distancoj estis

proporciaj al la kvadrato de la tempo. Sekve, post 1, 2, 3 tempunitoj la globeto moviĝis 1, 4, respektive 9 distancunitojn. De siaj mezurrezultoj li ankaŭ sciis fari la konkludon ke la maso de falanta objekto ne influas la falrapidecon. En vakuo, kie la aerrezisto estas nula, kaj ŝtonoj kaj plumoj falus egale rapide.

**La lorno.** En la jaro 1609 Galilei eksciis ke Hans Lippershey de Nederlando inventis "spionvitron" per kiu oni de malproksime povas malkaŝi farojn de aliaj. Tio vekis la intereson de Galilei, kaj li konstruis lornon, kiun komercistoj tuj ekuzis por preparadoj por alvenantaj ŝarĝŝipoj, kiuj aperis ekster la marbordo. Post laboro dum iom da tempo la lorno pligrandigis 33-oble. Je la 7a de januaro 1610 li direktis ĝin al la stela ĉielo. Li vidis ke estas senfina nombro da steloj, kaj ke la Lakta Vojo konsistas el unuopaj steloj. Li vidis la diferencajn fazojn de Venuso, sunmakulojn, montojn kaj kraterojn sur la luno, la ringojn ĉirkaŭ Saturno kaj kvar lunojn rondirantaj ĉirkaŭ Jupitero. Li publikigis la rezultojn post nur iom da monatoj, en marto 1610, en la

libro *Sidereus Nuncius* (*La mesaĝisto de la steloj*).

**La suno aŭ la tero en la centro?** En la jaro 1609 Galilei eksciis pri la mondimgo de Copernicus, ke la Tero rondiras ĉirkaŭ la suno. Liaj propraj observoj konvinkis lin pri tio, sed la romkatolika eklezio instruis ke la Tero estas la centro de la universo. Kiam Galilei eldonis la libron *Dialogo pri la du mondsistemoj* ekestis ĥaoso. Li estis juĝita en 1633 kaj devis forĵuri la "eraran dogmaron". Post la kondamno li laŭdire diris "kaj tamen ĝi moviĝas". Li estis maljuna kaj

malsana, do li ricevis malseveran punon, deviga hejmrastado dum la resto de sia vivo.

Galilei daŭrigis sian scian laboron kaj eldonis en 1638 la libron *Interparolo kaj matematikaj montraĵoj pri du novaj sciencoj* en kiu li skribis siajn fizikajn teoriojn. Tie li ankaŭ proponis metodon por mezuri la rapidecon de la lumo.

En la jaro 1992 la romkatolika eklezio bedaŭris la inkvizician kondamnon per deklaro de la papo Johannes Paulus II, kaj en la jaro 2000 (!) la kondamno aboliciiĝis.

Lasse Granat

## Pri la vivo de elmigrinta svedo

de Linus Ganman



*Jen mi ekster la kafejo Maiasmokk en Tallinn dum mia unua vojaĝo al Estonio.*

*Jen foto en 2019 farita de Siv.*

*De maldekstre: Ingegerd, Roger, Linus kaj Magnus.*

*En la fono glitpilkisto. Ni staras ekster la kongresejo.*






## Mia vivo en Estonio

Mi loĝas jam pli ol ses jarojn en la ĉefurbo de Estonio kaj ankaŭ sukcesis lerni la nacian lingvon, sed mi ne havas eĉ unu estonan parencon. Ĉio realiĝis dank' al tio, ke mia ses jarojn pli aĝa frato estas bona korbopilisto.

En mia infanaĝo mi malofte sentis min lerta aŭ sperta. Mia pli aĝa frato ĉiam estis pli forta kaj ruza ol mi, kaj mi neniam sentis, ke mi havas ion propran intereson, kiu estas nur mia. Al mi tio sentiĝis kiel granda manko. Eble ofte estas tiel, kiam du gefratoj konkuras en siaj klopodoj por kompreni la sencon de la vivo.



*(Mi, Siv, ne povis ne enmeti la parton de foto el Facebook, pri kiu Linus skribas.)*

Foje mi estis fotomodelo en broŝuro pri sportvestoj. Tamen mi ne povis distingi "glacihokeilon" de "glitpilka batilo".

*(Pardonon Linus, ke mi iomete ŝanĝis vian frazon!)*

Kiam mi havis dek jarojn, mi tamen komprenis, ke mi facile komprenas kiel gramatike funkcias lingvoj. Mi ankaŭ komprenis, ke mia frato ne estas same lerta en tiu fakareo, kaj mi sekve komprenis ke tio estas areo, kie indas por mi plispertiĝi. Pro tio mi starigis antaŭ mi la celon lerni almenaŭ unu lingvon el ĉia granda eŭropa lingvogrupo.

Ili ja estas kvar – preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj apartenas al aŭ la ĝermanaj, slavaj, latindevenaj aŭ la finno-ugraj lingvoj.

(Parenteze mi devus mencii, ke mia kapablo facile kompreni gramatikaĵojn ne estas tute senbaza. Ambaŭ miaj gepatroj estas lingvospertuloj, kaj ĉiu en sia propra modo. Mia patrino emas alstrebi, ke ŝia lingva uzado, kaj eĉ foje la lingva uzado de aliaj, estu kiel eble plej laŭtradicia kaj laŭregula. Alivorte, ŝi emas rimarkigi, kiam iu esprimas ion, kion oni povus konsideri lingve erara. Mia patro aliflanke suferis disleksion kaj ofte misuzis vortojn aŭ misfleksis ilin, sed li havis tre bonan lingvan aŭdosenton, tiel ke li tre konvinke povis imiti la sonon de pluraj lingvoj. Li do povis plurminute elbuŝigi sonfluojn, kiuj konvinke sonis, kvazaŭ estus ekzemple itala, franca, finna aŭ rusa lingvo, sed tiuj vortoj kaj frazoj efektive neniam signifis ion. Lingve mi evidente heredis ion kaj de mia patro kaj de mia patrino. Fakte estas pli mistera la demando de kiu mia frato heredis sian komprenon por pilkludo!)

Mi do dekjaraĝe komencis lerni la rusan, kaj mia denaska lingvo ja estas ĝermana. Kiam mi havis dek tri jarojn mi komencis lerni la francan. Mi longe pensis, ĉu lerni ankaŭ iun finno-ugran lingvon, do certe la finnan, ĉar Finnlando ja estas la najbara lando de mia hejmlando kaj la komercaj kaj kulturaj ligoj inter Svedio kaj Finnlando ja estas multaj.

Dank' al miaj scioj de la rusa mi jam fruvive konatiĝis kun pluraj ruseparolantoj. Ekzemple en 1992, nur mallongtempe post la disfalo de Sovetunio, mi konatiĝis kun rusdevena talinanino. Ŝi diris al mi, ke ŝi ne volas plu resti en Estonio post ĝia liberiĝo, ĉar ŝi ne scipovas la estonan kaj iomete timas, ke la estonoj volus venĝi al la rusoj pro la soveta aneksado de Estonio. Tiutempe tuj post la disfalo de Sovetunio, neniu ja povis scii, kio atendos en la estonteco, kaj por eviti ĉiujn

riskojn, tiu virino tutsimple transloĝis en Svedion.

Kiam mi komencis vizitadi la gimnazion mi eksciis, ke oni tie povas studi la finnan. Ĉio sekve estis preta por ke mi komencu studi ĝin. Proksimume samtempe mi tamen ankaŭ eksciis, ke nia lernejo kultivas amikecurban projekton kun lernejo en Estonio. Mi klare memoris la vortojn de mia talina amikino kaj volis scii, kia estas la lando, kiun ŝi forlasis. Pro tio mi rezignis mian intencon studi la finnan, kaj komencis anstataŭe memstare iomete studi la estonan por prepariĝi por la partopreno en la amikecurba projekto. Tio signifis, ke mi akceptis dum semajno estonan lernanton en mia hejmo, kaj vizitis la saman lernanton en lia hejmo duonjaron poste.

Miaj klopodoj estis tre fruktodonaj. Mi do vizitis Estonion la unuan fojon aŭtune en 1994, nur tri jarojn post la liberiĝo de Sovetunio. Multaj el la homoj, kun kiu mi konatiĝis tie, neniam antaŭe estis eksterlande, kaj tial kompreneble estis por ili granda surprizo, ke tien venis eksterlandano, kiu jam iomete scipovas ilian lingvon. Kvankam mi tiam ankoraŭ ne parolis aparte bone, oni ĉiam akceptis min tre varme kaj kun malfermaj brakoj. Kompreneble tio vekis en mi apetiton plibonigi mian estonan.

Post la gimnazio la vivo tamen prenis alian direkton. Dum ioma tempo mi fakte konsideris iri en Estonion por studi tie en altlernejo, sed anstataŭe mi trovis laboron kiel kelnero en Norvegio kaj laboris tie dum 14 monatoj. Poste mi revenis en Svedion kaj trovis postenon kiel redaktisto. Tiun laboron mi havis dum pli ol dek jaroj. Kelkfoje mi pensis pri la ĝoja semajno en Estonio, sed la intencoj reiri tien nur ŝajnis pli kaj pli foraj. Mi tamen fervore ekde 1994 skribas taglibron, kaj inter la jaroj 2002 kaj 2005 mi fakte skribis en ĝi sole en la estona, por vivteni la lingvoscion! Sed en mia hejmurbo mi ne konis iun, kun kiu paroli la lingvon! Tio estis iomete kvazaŭ surtera naĝekzerco!

En 2010 mi perdis la postenon, kiun mi havis dum pli ol dek jaroj. Ĉar mi ankoraŭ estis vigla kaj laborpova, mi pensis ke la pensiula vivo ne estas por mi, kaj pro tio mi kompreneble komencis serĉi novan postenon. Dum du jaroj mi forsendis ĉirkaŭ 160 respondojn pri anoncitaj postenoj kaj iris al 42 intervjuoj, sed la rezulto estis tute senfrukta. Por ŝajnigi al mia mentoro en la laborperejo, ke mi estas kreiva, mi tamen ankaŭ komencis serĉi laboron eksterlande. Pli precize – mi respondis anoncon pri posteno en Talino!

La talina labordonanto volis, ke mi venos por labori tujtube. Mi iom hezitis, ĉar mi pensis ke mi kiel 35-jaraĝa estas tro aĝa por transloĝi eksterlanden. Nun, pluraj jaroj pli poste, kiam mi ja estas eĉ pli aĝa, mi senhezite povas konfirmi, ke tio estis tre stulta kaj trompa penso. Kaj mi estas vere kontenta kun mia fina decido transloĝi.

Dank' al miaj bazaj scioj de la estona estis por mi facile senti sin hejme jam ekde la komenco de mia loĝado en Estonio. Mi vere klare memoras, ke en la komenco mi apenaŭ kuraĝis paroli la estonan kun iu, sed paŝon post paŝo tio nur fariĝis pli kaj pli facila. Kiam eksterlandanoj klopodas paroli la estonan, estonoj tre ofte transiras al la angla, ĉar ili pensas, ke tutsimple estas pli facile por eksterlandanoj paroli la anglan ol la estonan. Al mi tio tamen okazas nur tre malofte, kaj eble tio signifas ke mi havas sufiĉe konvinka elparolo. (Dankon, Paĉjo!) Mi ja scias ke mi ofte faras lingvajn erarojn kaj uzas malĝuste elektitajn vortojn (Pardonon, Panjo!), sed evidente almenaŭ iom estone sonanta elparolo sufiĉas por ke la kunparolantoj ne transiru al la angla.

Post mia transloĝiĝo en Estonion mi kelkfoje konsideris reiri en Svedion, sed en la fino de ĉiu tia klopodado ĝis nun tamen ŝajnis pli sekura kaj trankvila la alternativo resti en Estonio. La memoroj pri la tre senfrukta procezo de laborserĉado dum miaj lastaj du



jaroj en Svedio daŭre estas tre doloraj. Kaj, fakte, en Estonio mi ja havas preskaŭ ĉion, kion mi bezonas por senti min ĝoja en la vivo. Krome, se al mi mankas io, kion oni trovas nur en Svedio (ekzemple fermentinta baltharingo), la vojo trans la Balta maro neniam ŝajnas al mi tro longa.

Kia do estas mia vivo en Estonio? Grandparte mi havas la samajn ŝatokupojn kiel antaŭe. Mi jam multajn jarojn estas fervora ĥorkantisto, kaj kompreneble ĝuste tial Estonio estas por mi ideala lando kie loĝi. Onidire la plejmulto de la estonoj ja estas fervoraj ĥorkantistoj, ĝuste kiel mi. Nun mi estas ano de du ĥoroj, kaj kelkfoje mi kantas ankaŭ en pliaj ĥoroj. Tia estas la vivo de tenoro. Facile estas trovi eksterordinarajn

komisiojn. Ili falas sur min kvazaŭ aŭtunaj pomoj en la manon. Mi ankaŭ vere ŝatas mian nunan hejmurbon Talinon, kie ĉio ĉiam estas proksima kaj ofte eĉ je piedira distanco. Alia konsekvenco de mia loĝado en Talino estas, ke mia percepto pri la ĉirkaŭaĵo iom ŝanĝiĝis. Kiam mi loĝis en Svedio mi ofte kaj eĉ iom impulsigeme feris en Gotenburgo aŭ Norvegio, sed tiel mi ja jam ne povas fari. Feriante mi nun pli precize elektas ekzemple Vilnon aŭ Rigon. Mi tre ŝatas ambaŭ tiujn urbojn.

Iom ironie estas, ke Estonio kultivis multajn elstarajn korbopilistojn. Logike, tiu el ni du fratoj en mia familio kiu devus loĝi en Estonio, ne estas mi, sed mia pli aĝa frato!

/Linus Ganman



Muziko estas grava por Linus. Jen ŝildo kaj ligilo al lia turneo al Tel Aviv kun lia ĥoro:

<https://www.youtube.com/watch?v=sP3vllPuK0s>

Jen ligilo al ĥora turneo al Moskvo:

<https://meloman.ru/concert/mso-mustonen>

Tamen, Linus, ankaŭ svedaj urboj bonvenigas ĥorojn. Bonvenon al Svedio! /Siv

## Notoj el *Veckan*, magazino de la jaro 1904

LA PLEJ LONGA TELEFONA KONEKSO troviĝas inter Boston kaj St. Louis, distanco de 1,400 anglaj mejloj. Ĉi tiu linio estas pli ol dufoje longa ol iu eŭropa telefonlinio.

AMERIKO havas ĉirkaŭ 350,000 pli da telefonoj ol la tuta cetera mondo.

EL 1,000 FRAŬLOJ estas 38 krimuloj, kiam inter 1,000 edziĝintaj viroj troviĝas nur 18 krimuloj.

*Saluton,*

Mia nomo estas Daniel Viberg. Mi studis Esperanton per DuoLingo kaj en junio mi partoprenis en la daŭriga kurso en Gotenburgo. Mi loĝas en Jönköping, sed esperantoklubo ne troviĝas ĉi tie.

Ĉu vi volus helpi al mi trovi interesitajn homojn, kiuj volas

1) lerni esperanton. Ni povus havi kontakton kun studronda organizo por havi lokon, kurson kaj eblecon uzi komputilojn

2) eble estontece krei esperanto-klubon.

Se jes – skribu al mi: [danielviberg@protonmail.com](mailto:danielviberg@protonmail.com)

*Ĝis baldaŭ!*



*Pixabay-bildo pri Jönköping*